



Januaro/ Februaro/ Marto - 2012

# Oomoto

INTERNACIA



*Forprenante la murojn videblan kaj nevideblan*

*La Rankontoj el la Spirita Mondo*

*Agordon inter landoj en la mondo*

*Esperanta Utafesto de Oomoto en Brasilia*

*Kolekto da Paraloj pri dikredo*

*Shinoda*

### **Diaj Revelacioj 03**

Revelações Divinas 03

### **Forprenante la murojn videblan kaj nevideblan 04**

Arrancando as muralhas visíveis e invisíveis 05

### **La Rakontoj el la Spirita Mondo 06 08**

Contos do Mundo Espiritual 07 09

### **Agordon inter landoj en la mondo 10**

Harmonia entre os países do mundo 11

### **Esperanta Utafesto de Oomoto en Brasilia 12 14**

Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto, em Brasilia 13 15

### **Omaĝo al Oomoto fare de Deputita Ĉambro 16**

Câmara de Deputados homenageia a Oomoto 17

### **Gratulkunveno de la 5a datreveno de Oomoto Internacia 18**

Reunião de congratulação pelo 5º aniversário da Oomoto Internacional 19

### **Parolado de Deputito Walter Ihoshi 20**

Discurso do Deputado Walter Ihoshi 21

### **Kolekto da paroloj pri dikredo 22**

Coletânea de palavras sobre a crença em Deus 23

#### **Oomoto:**

SHIN - QI 14 Conj. 5 Casa 23 Lago  
Norte Brasília DF - Cep: 71.530.050

#### **Editoro/Editor**

MAEDA Shigeki

#### **Respondeca ĵurnalista / Jornalista Responsável:**

MAEDA Shigeki

#### **Redaktoro en Esperanto / Redator em Esperanto:**

MAEDA Shigeki

#### **Redaktoro en la portugala / Redator em Português:**

Benedicto Silva

#### **Tradukisto / Tradutore:**

Benedicto Silva

#### **Paĝarangô / Diagramação:**

Ítalo R. Gonçalves - Editora Kiron  
Paulo de Tarso Soares Silva - Editora Kiron

#### **Kovrilo / Capa**

SHINODA Umazo

#### **Malantaŭa kovrilo / Contra capa:**

MAEDA Shigeki

#### **Eldono / Tiragem:**

1000

## Diaj Revelacioj

Novjaron (lunan) en la 25a jaro de Mejji (1892)

14. Nu, japana popolo, en Dia rigardo vi estas tiel malcerta kvazaŭ fajenca taso metita sur la rando de ŝtonmasonita puto. Mi ne povas lasi Min nur rigardi tion. Baldaŭ Mi, Dio Uŝitora, faros la grandan purigadon.

15. Kiom ajn klopodos homoj, la sankta konferenco neniam malfermiĝos. Escepte de Dio, neniu povas ĝin malfermi. Mi malfermos.

16. Tokio fariĝos miskantejo <sup>7)</sup> same kiel antaŭe. Ĝia nuna stato ne daŭros eterne.

*7) Miskantejo: kampo, kie abunde kreskas miskantoj; miskanto estas multjara kano pli aŭ malpli du metrojn alta. Ĉi tie miskantejo signifas simple sovaĝejon plenan je fiherboj.*

## Revelações Divinas

Primeiro dia (lunar) do ano 25 da Era Mejji (1892)

14. Então, ó povo japonês, ao olhar de Deus sois tão hesitante como uma xícara de faiança colocada à beira de uma cisterna. Não posso quedar-Me apenas olhando isso. Em breve Eu, o Deus Ushitora, empreenderei a grande purificação.

15. Por mais que os homens se empenhem, a sagrada assembleia jamais se abrirá. Com exceção de Deus, ninguém pode abri-la. Eu abrirei.

16. Tóquio se tornará um campo de eulálias <sup>7)</sup>, tal como antes. Seu estado atual não durará eternamente.

*7) Campo de eulálias: campo onde crescem abundantemente eulálias; trata-se de uma gramínea perene, de cerca de dois metros de altura. Aqui, campo de eulálias significa simplesmente região selvagem abundante em ervas daninhas.*

## Forprenante la murojn videblan kaj nevideblan

**Direktoro de Oomoto Internacia  
MAEDA Shigeki**

**E**n la 13-a de okt. 2010, en Brasilia, la ĉefurbo de Brazilo, sukcese okazis la Esperanta Utafesto de Oomoto, en la etoso, plena je gratulo pro la 50a datreveno de la ĉefurbo Brasilia. Koncerne la utafeston kaj aliajn kromeventojn, bonvolu tralegi aliajn paĝojn, en kiuj troviĝas pli detalaj raportoj.

Nu, la celo de la Prapatra Dio, kiu posedis sinjorinon DEGUĈI Nao, Fondintino de Oomoto, estas konstruo de la mondo Miroku, la mondo, regata de Dio Miroku, t.e. ideala mondo de homaro sen militoj, sen diskriminacioj, sen malsatego kaj sen suferegoj.

Kiel la necesajn kondiĉojn por realigi tiun idealan mondon, Majstro DEGUĈI Onisaburo, Kunfondinto de Oomoto, jene mencias en sia verko "La Rakontoj el la Spirita Mondo (en la volumo 64)".

*"Antaŭ ĉio ni, Diaj infanoj kaj la vivantaj sanktejoj de Dio, devas forpreni la du grandajn murojn, videblan kaj nevideblan (materian kaj moralan) en la mondo. La plej grandaj materiaj obstakloj konsistas en militpreparo kontraŭ aliaj landoj kaj fermo de nacia teritorio.*

*Kaj la plej grandaj moralaj muroj konsistas en malamikeco inter nacioj kaj inter rasoj kaj malamikeco inter religiaj organizoj, mi pensas.*

*Por forpreni ĉi tiujn grandajn materiajn murojn en la mondo ni devas forpreni unue de la moralaj muroj.....*

*Tiaj esprimoj, nome, sankteco, spirito, spiriteco k.s. ne temas pri aprte mirindaj kaj misteraj aferoj, sed temas nur pri la koro de la homara amo, t.e. havi la koron de frateco ankaŭ al aliaj nacioj kaj rasoj, same kiel al niaj amikoj, kun nienia muro al ili kaj kun koro malfermita. La nur sola kaŭzo, kiu faras la muron, ja estas memo kaj egoo....."*

La utafesto de Oomoto celas nenion alian ol forpreni tiajn materiajn kaj moralajn murojn. La ceremonio de Utafesto esprimas la figuron de la paca mondo, en kiu homoj ĝoje vivas kun Dio, nome la figuron de Mondo Miroku.

Utafesto okazas en ĉiujara somero en Kameoka, kadre de la Granda Festo de Zujsej, unu el la kvar grandaj festoj de Oomoto. Sed ĉi tiu uta-



festoj estas evento enlanda: por plenumi la forigon de la muroj materia kaj morala en la mondo, kiun Majstro DEGUĈI Onisaburo mencias en sia verko, nepre necesa estas la organizado internacia.

Tiel Oomoto decidis organizi la utafeston en Esperanto, en internacia lingvo. Kaj por la unua Esperanta utafesto oni elektis la lokon en Ajabe kaj en la 14a de aŭgusto, 2007, ĝi okazis sur la noa scenejo en la Templo Ĉoosej-den, kun la 74 esperantistoj el 13 landoj. Ĉi tiu utafesto, unua en Esperanto, ja vidis sian belegan rezulton.

Por tiu ĉi unua Esperanta Utafesto la Kvina Spirita Gvidantino kontribuis jenan utaoon:

*120-a jar',  
jen datreven' de l' Dia  
lingvo Esperant'  
kaj utafesto nia  
nun ovriĝas al la mond'.*

La granda sukceso de ĉi tiu utafesto en Esperanto, unuafoja en ĝia historio, ja donis la kuraĝon al la koncernatoj por daŭre organizi ĝin eĉ en transmaraj landoj. Kaj en la 13-a de oktobro, 2010, okazis en Brasilia, la ĉefurbo de Brazilo, sub la titolo Esperanta Utafesto de Oomoto en Brasilia.

La unua Esperanta Utafesto de Oomoto okazis en 2007, en Ĉoosejden, Ajabe, la sankta tero de Oomoto, kaj la dua okazis en Brasilia, kiun brazilanoj nomas kiel la novan sanktan teron de la mondo. Do, en kiu lando okazos la tria Esperanta Utafesto de Oomoto? Ĉu en Jerusalemo? Kiel la Kvina Spirita Gvidantino utaaas:

*Ho, aspiras mi  
al la utaa festo  
ja en Esperant'  
fratar' de l' tuta mond'  
jen sur land' Jerusalem'.*

## Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto

— Arrancando as muralhas visíveis e invisíveis —

**Shigeki MAEDA**  
**Diretor da Oomoto Internacia**

**E**m 13 de outubro de 2010, em Brasília, Capital do Brasil, realizou-se com sucesso o Festival de Uta da Oomoto, num clima referto de felicitações pelo 50º aniversário da Capital do Brasil. A respeito do Festival de Uta e demais eventos, queiram ler outras páginas, com maiores detalhes.

Ora, o objetivo do Deus Ancestral que possuiu a senhora Nao DEGUCHI, a Fundadora da Oomoto, é a construção do mundo de Miroku, um mundo governado pelo Deus Miroku, isto é, um mundo ideal para a humanidade, sem guerras, sem discriminações, sem grande fome geral e sem grandes sofrimentos.

Como condições necessárias para a realização desse mundo ideal, o Mestre Onisaburo DEGUCHI, Cofundador da Oomoto, assim se refere em sua obra *Contos do Mundo Espiritual* (no vol. 64):

“Antes de tudo, nós, crianças de Deus, vivendo nos santuários divinos, devemos arrancar as duas grandes muralhas, a visível e a invisível (material e moral) existentes no mundo. Os maiores obstáculos materiais consistem no preparo militar contra países e o fechamento do território nacional.

E as maiores muralhas morais são a inimizade entre nações e entre raças, bem como a inimizade existente entre as organizações religiosas, penso eu.

Para extinguir estas grandes muralhas materiais do mundo devemos primeiramente arrancar as muralhas morais...

Expressões como santidade, espírito, espiritualidade etc. não se referem a coisas particularmente admiráveis e misteriosas, mas apenas ao coração amoroso da humanidade, isto é, ter o sentimento de fraternidade também para com as outras nações e raças, da mesma maneira que aos nossos amigos, sem nenhuma muralha contra eles e com o coração aberto. A única causa que ergue a muralha são o individualismo e o egoísmo.

O Festival de Uta da Oomoto tem em mira nenhuma outra coisa além de arrebatar essas muralhas materiais e morais. A cerimônia do Festival de Uta exprime a imagem do mundo

de paz, onde os homens vivem alegremente com Deus, isto é, a imagem do Mundo de Miroku.

O Festival de Uta é realizado todo ano, no verão, em Kameoka, no quadro da Grande festa de Zusei, uma das quatro grandes festividades da Oomoto. Este Festival de Uta, porém, é um evento nacional destinado a eliminar as muralhas material e moral do mundo, acontecimento que o Mestre Onisaburo Deguchi menciona em sua obra como absolutamente necessária organização internacional.

Desse modo, a Oomoto decidiu organizar o festival de Uta na língua internacional Esperanto. Para a realização do primeiro Festival de Uta foi escolhida a cidade de Ayabe, e a 14 de agosto de 2007 ele teve lugar no palco de nô do Templo Choo-sei-den, com a participação de 74 esperantistas vindos de 13 países. Este festival de Uta, o primeiro em Esperanto, teve, de fato, um belíssimo resultado.

Para esse primeiro Festival de Uta em Esperanto a Quinta Guia Espiritual da Oomoto contribuiu com o seguinte poema:

*Cento e vinte anos  
do Esperanto de Deus:  
língua mundial;  
e o festival de uta  
torna-se universal.*

O grande sucesso deste Festival de Uta em Esperanto, realizado pela primeira vez em sua história, encorajou os organizadores a darem prosseguimento a ele mesmo em países de além-mar. E em 13 de outubro de 2010, ele teve lugar em Brasília, capital do Brasil, com o título de Festival de Uta em Esperanto da Oomoto em Brasília.

O primeiro Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto, realizou-se em 2007, no Cooseyden, Ayabe, território sagrado da Oomoto, e o segundo teve lugar em Brasília, cidade que os brasileiros denominam a nova terra santa do mundo. Então, em que país se realizará o terceiro Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto? Será em Jerusalém? Como a Quinta Guia Espiritual canta neste uta:

*Oh! Aspiro eu  
ao festival de uta  
em Esperanto:  
irmãos do mundo todo  
na bela Jerusalém.*

## La Rakontoj el la Spirita Mondo

Verkita de DEGUĈI Onisaburo  
Esperanto: MAEDA shigeki

(...)Permesite de la Granda Reĝo, mi kun la loka garddio <sup>1)</sup> kaj Hujoo ĉeestis en la juĝado kiel observanto. Al la tribunuo, situanta en tiom alta loko, kiom oni devas suprenrigardi, degnis aperi la Granda Reĝo, kaj sur la sidejo 2 aŭ 3 ŝakuojn (ĉirkaŭ 66-99 centimetroj) malalta de tiu tribunuo, vice sidis juĝistoj-dioj kun furiozaj mienoj. Sur la plej malalta loko en la juĝejo multaj homoj humile sidis riverence kun kapo al tero. Kiam mi trarigardis ilin, inter ili mi trovis ankaŭ tiujn vojaĝantojn, kiuj min sekvante transvadis la riveron de serpentegoj; ili atendis la deklaron pri sia verdikto. La juĝotoj estis ne nur japanoj, sed mi multe vidis ankaŭ alilandanojn, kiel ekzemple ĉinoj, koreoj, eŭropanoj k.a..

*Alilandanojn  
en si neniam metas  
la bild' infera.*

Mi ekrememoris unu senrjuon <sup>2)</sup>. Suspektante la scenon, mi flustre demandis la disenditon Hujoo pri tiu kialo.

Pro kio? Hujoo tute ne volis respondi la demandon nur skuante la kapon. Mi do retenis min plu demandi.

Post momento, mi pretervole rigardis la fizionomion de la Granda Reĝo. "Aha!" surprizita mi preskaŭ renversiĝis. Ambaŭflanke min subtenis la loka garddio kaj Hujoo. Certe mi svenus, se ambaŭ ne prizorgus min. La mieno de la Granda Reĝo, ĝis nun milda kaj gracia kun nespotebla imponeco kaj bela senlima rideto, abrupte ŝanĝiĝis ruĝa, la okuloj fariĝis gigantaj, la buŝo plifendiĝis ĝis ambaŭ oreloj kaj elmontradis flaman langon. Ankaŭ la mienoj de juĝistoj fariĝis furiozaj tiel ke mi tuj ĉesis rigardi. La juĝejon ekregis granda hororo.



► Kaligrafas Majstro Onisaburo

La Granda Reĝo mansigne alvokis unu el juĝistoj, sidantaj sur la meza tribunuo; la juĝisto humile iris antaŭ la Grandan Reĝon. La reĝo donis al li unu libron; ĝin respektoplene tenante super sia kapo, la juĝisto revenis al sia loko kaj tuj komencis deklari la verdiktojn de la pekuloj, vokante iliajn nomojn unu post alia. Responde al nomvoko, gardisto laŭvice kuntrenis koncernan pekulon kaj poste tuj malaperis. La juĝado estis tiel simpla, ke ĝi konsistis nur el verdiktado; malsame kiel tiu de nia mondo, ne troviĝis funkcioj: antaŭesploro, apelacio, la Plejsupera Tribunalo kaj eĉ advokato. Mi rigardis returnen al Hujoo kaj demandis: "Kial tiel simpla estas la juĝo de la spirita mondo?"

"La juĝo en la homa mondo," respondis Hujoo, "ofte invitas eraron. La homo estas tute senpova antaŭ nevideblaj objektoj. Pro tio oni devas ekzameni atente plurfoje; sed en la spirita mondo la juĝo estas plenumata de Dio mem, libere travidanta la tri mondojn (antaŭmondon, ĉi tiun mondon kaj postmortan mondon): kiom ajn simpla estas la maniero, okazas nenia eraro. Krome, la pezeco aŭ grandeco de peko fariĝas tute klara laŭ vesta kolorŝanĝo, kiam oni transvadas la riveron de Serpentegoj tial tute ne necesas plu juĝi."

Kiam finiĝis la verdiktado al ĉiu pekulo, la Granda Reĝo kviete stariĝis kaj revenis al sia ĉambro. Ĉar ankaŭ mi estis ree invitita veni antaŭ la reĝon, mi Lin vizitis kaj,

kiam mi levis mian kapon timoplene, la terura mieno jam komplete ŝanĝiĝis al la antaŭa milda kaj amplena fizionomio. En "Diaj Revelacioj" troviĝas jena parto pri Fondintino DEGUĈI Nao:

" - - - (Nao) estas animo, tute sama kun Dio Uŝitora; tial, se antaŭ ŝin venas vera homo, kiu jam bonŝanĝis sian koron, ŝi fariĝas neesprimeble bona kaj milda dio. Sed se venas apud ŝin tia homo, kiu havas eĉ iom da profitemo, orgojlo, intrigo, malamikeco kontraŭ

## Contos do Mundo espiritual

Autor: **Onisaburo DEGUCHI**

Esperanto: **Shigeki MAEDA**

Português: **Benedicto SILVA**

### Julgamento no reino intermediário

Com a permissão do Grande Rei, em companhia do deus guardião local 1), e de Huyô, assisti a um julgamento como observador. À tribuna, situada num lugar tão elevado que se devia olhar para cima, dignou-se de aparecer o Grande Rei, e na plateia localizada 2 ou 3 shaku (cerca de 66 ou 99 centímetros) mais abaixo daquela tribuna, sentavam-se em fileira deuses-juizes com semblantes furiosos. No lugar mais baixo do tribunal muitas pessoas estavam humildemente sentadas em reverência, de cabeça baixa. Ao correr os olhos pelo ambiente, encontrei entre elas também os viajantes que me acompanharam na travessia a vau do rio com grandes serpentes. Aguardavam o seu veredicto. Os réus não eram apenas japoneses. Vi igualmente muitos estrangeiros, por exemplo: chineses, coreanos, europeus etc.

Os estrangeiros  
nunca são colocados  
no quadro infernal.

Lembrei-me desse senryu 2). Desconfiando da cena, indaguei baixinho ao emissário de Deus, Huyô, a causa disso.

Por que? Huyô não quis absolutamente responder a pergunta, apenas meneando a cabeça. Então detive-me de fazer mais perguntas.

Um momento após, olhei involuntariamente a fisionomia do Grande Rei. “Ah! quase caí de susto. De ambos os lados me ampararam o deus guardião local e Huyô. Decerto eu desmaiaria, se eles não me tivessem socorrido. A expressão do Grande Rei, até agora suave e graciosa, imponentemente pacífica e infinitamente sorridente, enrubescceu-se bruscamente, os olhos se lhe tornaram gigantescos, a boca fendeu-se até as orelhas, lançando uma língua ignescente. Também os semblantes dos juizes fizeram-se tão furiosos que imediatamente desviei meu olhar. O tribunal foi dominado por um grande terror.

Com um aceno de mão, o Grande Rei chamou um dos juizes que se achavam sentados na tribuna central; o juiz caminhou humildemente à frente do Grande Rei. Este deu-lhe um livro.

Segurando-o respeitosamente acima da cabeça, o juiz voltou a seu lugar e imediatamente começou a declarar os veredictos dos pecadores, chamando os seus nomes, um após outro. De acordo com a chamada, um guarda arrastava consigo o pecador em questão e, em seguida, logo desaparecia. O julgamento era tão simples que consistia apenas de veredicto; diferentemente do de nosso mundo, não havia funções: investigação, apelação, supremo tribunal, nem mesmo advogado. Olhei para Huyô, atrás de mim, e perguntei-lhe: “Por que é tão simples o julgamento no mundo espiritual?”

“Julgamento no mundo humano”, respondeu Huyô, “frequentemente convida a erro. O homem é totalmente impotente perante as coisas invisíveis. Por isso, deve-se examinar atentamente diversas vezes; mas no mundo espiritual o julgamento é exercido pelo próprio Deus, que vê livremente através dos três mundos (pré-mundo, este mundo e o mundo póstumo): por mais simples que seja o procedimento, não ocorre nenhum erro. Além disso, a gravidade ou a dimensão de um pecado torna-se absolutamente clara de acordo com a mudança de cor da veste, quando se atravessa a vau o rio das serpentes; por isso não há, absolutamente, mais necessidade de julgar.”

Quando terminou o veredicto de todos os pecadores, o Grande Rei levantou-se calmamente e voltou ao seu aposento. Como eu também tivesse sido novamente convidado a vir perante o rei, visitei-o e, ao erguer a cabeça temerosamente na fisionomia anterior, suave e amorosa. Nas Revelações Divinas encontra-se a seguinte passagem a respeito da Fundadora Nao DEGUCHI:

“(Nao) é uma alma absolutamente igual ao Deus Ushitora; por isso, se à sua presença vem uma pessoa verdadeira que já melhorou o seu coração, ela se transforma num deus infelizmente bom e suave. Mas se chega junto a ela uma pessoa que tenha um pouquinho sequer de avidez, orgulho, intriga, inimizade para com Deus etc. os traços dela começam a transformar-se e ela se torna uma alma tão terrível como a de um ogro ou de uma serpente gigantesca.”

Quando li estas frases pela primeira vez, não pude deixar de lembrar-me da cena do

Dio k.a. , ŝiaj trajtoj ekŝanĝiĝas kaj ŝi fariĝas tiel terura animo, kiel tiu de ogro aŭ serpenteĝo.”

Kiam mi legis ĉi tiujn frazojn por la unua fojo, mi ne povis ne rememori la scenon kiam mi renkontiĝis kun la Granda Reĝo en la intera regno. Kaj kiam mi unuafoje havis la honoron intervidiĝi kun Fondantino DEGUĈI Nao, pro ŝia gracia, milda kaj amplena vizaĝo mi ne povis ne rememori la vizaĝon de la Granda Reĝo.

La Granda Reĝo ekstaris, alproksimiĝis al mi, kaj forte premis miajn manojn kun larmoj sur siaj okuloj.

“Nu, sinjoro Trifolio,” diris la reĝo kun iom morna tono, “kvankam dolorplena, de nun bonvolu komenci la asketadon en la obskura mondo. La homo, kiu havas la sorton kiel mesio de ambaŭ mondoj materia kaj spirita, devas nepre ellerni la praktikismon pri mesio. Nun mi tre deziras proponi al vi almenaŭ varman akvon, sed dum la asketado estas tute malpermesate doni varman akvon eĉ la malvarman. Nu, komencu la praktikadon laŭeble frue.”

“Do, bonvole gvidu ĉi tiun, mi elkore petas,” tiel dirante al la reĝo, la loka garddio, sen rigardi malantaŭen, denove saltis sur la altan nubon kaj foriris.

Ankaŭ la disendito Hujoo, okulsalutante al la reĝo kaj nenion dirante al mi, rapide forlasis la lokon. Postlasita, mi restis iom konfuzita. Tiumomente, la fizionomio de la Granda Reĝo denove ekŝanĝiĝis: la okuloj brilegis spegule kaj la buŝo plifendiĝis ĝis ambaŭ oreloj. Pro granda teruro mi ne povis levi mian kapon. Tiam, la juĝisto, kiu antaŭe deklaris la verdikton, venis kun gardistoj kaj tuj deprenis mian blankan veston por ŝanĝi al la griza, kaj min puŝis eksteren tra la unua pordo.

Kiam forpuŝita mi tuj rigardis ĉirkaŭon, antaŭ mi etendiĝis unustria vojo malpura kaj mallarĝa, kaj ĉi tiun baris velkintaj herberoj kiel graciaj pingloj. Mi povis iri nek returnen nek antaŭen; do mi decidis iri flanken, sed tie estis profunda kaj larĝa fosaĝo, plenplena de teruraj kaj abomenaj insektoj. Dum mi hezitis iri antaŭen kaj cerbumis tiel kaj ĉi tiel, en la ĉielo aperis nigraj suspektaj nuboj, inter kiuj fikse rigardis al mi io terura kiel ogro. Malantaŭ mi, terurvizaĝa gardisto, vestita per flaveruĝa hapio<sup>3)</sup>, pretas por trapiki min per akra lanco kun kruforma pinto. Jam senrimede! Mi komencis iri antaŭen kvazaŭ forkuri.

Post pli-malpli 4-5 ĉooj ( ĉirkaŭ 400-500 metroj) da irado mi trovis larĝan riveron ŝajne tre profundan, sed kun nenia ponto. Kiam mi senkonscie enrigardis la riveron, iu nekonata homo dronis en ĝia malpura akvo, simila je sango aŭ puso, kaj ties tutan korpon svarme kovris hirudoj kaj suĉis lian sangon tiom, kiom al ili jam mankis suĉejo. La vojaĝanto plorkriis per la voĉo, plena je sufero kaj malĝojo. Ah, ankaŭ mi devas transiri ĉi tiun larĝan kaj profundan riveron. Sed kiamaniere? Ĉu transflugu? Ne, tio ne eblas al mi senflugila! Krome, de malantaŭe, min postsekvas ruĝvizaĝa gardisto kun ogra fizionomio por min trapiki per akra lanco. Ha, tute senlireja situacio! Mi nur ĉagreniĝis ne povante eĉ plori. Tiam mi ekrememoris la rulaĵon, kiun mi ricevis de la loka garddio. El la poŝo mi ĝin elprenis kaj humile elvolvis; tie estis skribitaj la literoj “Amaterasu-Ookami, Kannagaratamaĉihaemase” kun skribspuro kaj tuĉkoloro freŝaj kaj belaj. Mi nur senkonscie recitis laŭ tiuj literoj “Amaterasu-ookami, Kannagaratamaĉihaemase”; tiumomente, mia korpo jam troviĝis trans la rivero.

La gardisto jam senespere sin turnis al la direkto, el kiu li venis. Portempe mi trankviliĝis, sed kiam mi komencis paŝi, subite intensiĝis malvarmo kaj miaj membroj jam perdis funkcion pro frostiĝo. En tia stato ja aperis ora lumo. Surprizita, mi turnis mian rigardon al ĝi; post momento, la lumbulo rapide malsuprenvenis antaŭ min, ĉirkaŭ 2-3 ŝakuojn (proksimume 66-99 centimetroj) apud miaj piedoj.

(el V.1 Ĉapitro 7 “Juĝo de la Intera Regno”)

1) loka garddio: temas pri dio, kiu gardas kaj prizorgas loĝantojn en iu difinita loko kaj kies sanktejo ordinare troviĝas ankaŭ en tiu sama loko.

2) senrjuo: japana mallonga poemo, kun sama formo kiel hajko, t.e. konsistanta el 17 literoj, sed sen kondiĉo pri sezonvorto; ofte kun temoj, satira, epigrama kaj humora; komencis prosperi ekde la mezo de la epoko Edo.

3) hapio: mallongbaska kimono, uzita de malaltklasa samurajo aŭ lakeoj; nuntempe uzita de ĉarpentistoj, ĝardenistoj k.a. kiel laborvestoj; aŭ uzita de adeptoj de loka garddio en ties festo sezona aŭ jara.



meu encontro com o Grande Rei no reino intermediário. E quando pela primeira vez tive a honra de entrevistar-me com a Fundadora Nao DEGUCHI, pelo seu semblante gracioso, suave e amoroso, não me foi possível deixar de lembrar-me do semblante do Grande Rei.

O Grande Rei pôs-se de pé, aproximou-se de mim e apertou fortemente minhas mãos, com os olhos lacrimejantes.

“Então, senhor Trifólio,” disse o rei num tom um tanto melancólico, “embora dolorosa, a partir deste instante tende a bondade de iniciar a ascese no mundo obscuro. O homem destinado a cumprir um messiado em ambos os mundos, material e espiritual, deve sem falta aprender a prática desse messiado. Agora o meu grande desejo é oferecer-vos pelo menos uma água quente, mas durante a ascese é absolutamente proibido dar água quente ou até mesmo fria. Começai, pois, a prática, o mais cedo possível.”

Portanto, tenha a bondade de guiar este, eu lhe peço cordialmente.” Assim falando ao rei, o deus guardião local saltou novamente para a alta nuvem e partiu sem olhar para trás.

Também Huyô, o emissário de Deus, saudando o rei com o olhar e sem nada me dizer, abandonou rapidamente o local. Deixado para trás, ali fiquei um pouco perturbado. Nesse momento a fisionomia do Grande Rei começou a transformar-se de novo: os olhos fulguraram com reflexos e a boca fendeu-se até as orelhas. Tamanho era o meu terror que não pude erguer a cabeça. O juiz, que antes havia declarado o veredicto, veio com guardas e foi logo retirando minha roupa branca para trocá-la por outra cinzenta, impelindo-me para fora através da primeira porta.

Repelido assim, olhei imediatamente ao redor. À minha frente estendia-se uma estrada simples, suja e estreita, interceptada por ervas murchas semelhantes a graciosas agulhas. Não podia caminhar nem para a frente, nem para trás. Então resolvi caminhar para o lado, mas ali havia uma fossa funda e larga, repleta de insetos terríveis e repugnantes. Enquanto eu hesitava se prosseguiria e matutava nisto ou naquilo, surgiram no céu nuvens negras e suspeitas, entre as quais algo horroroso como um ogro olhava-me fixamente. Às minhas costas um guarda de semblante pavoroso, vestindo um hapi 3) amarelo-avermelhado, está prestes a picar-me com uma lança aguda, de ponta cruciforme. Já não havia remédio. Pus-me a caminhar para a frente, como que fugindo.

Depois de percorrer cerca de 4 ou 5 chô (aproximadamente 400 ou 500 metros), encontrei um rio largo, aparentemente muito fundo, mas sem nenhuma ponte. Quando olhei inconscientemente para o interior desse rio, uma pessoa desconhecida submergia em sua água suja, semelhante a sangue ou pus, e sobre seu corpo inteiro fervilhavam sanguessugas chupando-lhe o sangue com tanta avidez que a elas já faltavam espaços onde chuparem. O viajante soltava gemidos de dor e aflição. Ah, também eu devo atravessar esse rio largo e fundo. Mas como? Voando? Não, não é possível, pois não tenho asas! Além disso, seguem-me por trás um guarda de cara vermelha, com feições de ogro, disposto a transpassar-me com uma lança aguda. Ah, estou num beco sem saída! Eu apenas me afligia, não podendo sequer chorar. Nesse momento, lembrei-me do rolo que recebera do deus guardião local. Saquei-o do bolso e desenrolei-o com humildade; nele achavam-se escritas as palavras: “Amaterasu-Ookami, Kannagara tamachi haemase”, gravadas com traços e tinta frescos e formosos. Inconscientemente, recitei essas palavras: “Amaterasu-Ookami, Kannagara tamachi haemase”. Nesse instante, meu corpo já se encontrava além do rio.

Já desesperado, o guarda voltou-se para a direção de onde viera. Acalmei-me por algum tempo, mas logo que me pus a caminhar, intensificou-se o frio, e meus membros já perderam sua função, em virtude de seu congelamento. Com efeito, achando-me em tal situação, eis que apareceu uma luz dourada. Sobressaltado, dirigi-lhe meu olhar; um momento após, a bola de luz desceu rapidamente à minha frente, cerca de 2 ou 3 shaku (aproximadamente 66 ou 99 centímetros) junto de meus pés.

1) *Deus guardião local: trata-se de um deus que guarda e cuida dos habitantes de um determinado lugar, e cujo santuário se acha também nesse mesmo local.*

2) *Senryu: poema curto japonês, com a mesma forma do haikai, isto é, constituído de 17 sílabas, porém sem o emprego de palavra sazonal; o mais das vezes com assunto satírico, epigramático e humorístico; começou a prosperar desde os meados da época Edo.*

3) *Hapi: quimono curto usado por samurai de classe baixa ou lacaios; atualmente é usado por carpinteiros, jardineiros etc. como roupa de trabalho, ou também por adeptos de deus guardião local em sua festa sazonal ou anual.*

## Agordon inter landoj en la mondo

— Saluto ĉe la festeno de la 5a datreveno de Oomoto Internacia —

La Kvina Spirita Gvidantino  
DEGUĈI Kurenai

### Estimataj kaj karaj gesinjoroj

**K**un elkoraj saluto kaj danko mi turnas min al vi ĉiuj pro la ĉeesto en ĉi tiu kunveno por la 5-a datreveno de Oomoto Internacia. Kaj mi esprimas apartan dankon al gesinjoroj kaj geamikoj, kiuj helpadis nin kaj kunlaboradis kun ni ĝis hodiaŭ.

Nu, tiu ĉi jaro estas tre gratulinda por la lando Brazilo pro tio ke la ĉefurbo Brasilia ĉijare ricevis sian 50an datrevenon. Antaŭ 50 jaroj, tiam Prezidento Juscelino Kubitschek de Oliveira konstruis tre elegantan modernan urbon en la regiono, kie ĝis tiam kuŝis nur primitiva savano. Kaj la ĉefurbo, kiu tiam troviĝis en Rio de Janeiro, transokiĝis al tiu nove konstruita urbo, t.e. ĉi tiu Brasilia.

Ekde tiam Brasilia prosperis kiel la metropolo de la giganta kontinento kaj kiel la politika, ekonomia kaj eduka centro, kiu ludis gravan rolon por la progreso de Brazilo.

En tiu ĉi gratulinda jaro de Brasilia, ankaŭ Oomoto Internacia ricevis sian 5-an datrevenon kaj kiel memoraj eventoj ni organizis “Esperantan Utafeston”, unuafoje en neĵapa-

na lando, kaj aliajn koncernajn eventojn, kiel ekzemple, “Ekspozicio de la historio de Oomoto kaj Universala Homama Asocio” en Parlamento.

Interalie, la Utafesto, kiun ni celebris hieraŭ, estas grava evento de nia lando: ĉi tiu okazadis de la antikveco ĝis la mezepoko en ĉiu vilaĝo de Japanio, kaj estas paca sankta evento, kiu trankviligas ne nur Dian koron, sed trankviligas ankaŭ la koron de vilaĝanoj kaj purigas ĉiujn pekojn.

Mi vidas grandan signifon en tio, ke tiun sanktan aferon ĉi-foje ni povis plenumi en Brasilia, la sankta ĉefurbo de Brazilo, pere de Esperanto, la internacia lingvo, kiu metas sin surbaze de homamo.

Do, mi elkore deziras, ke ĉi-foja okazo fariĝu bona ŝanco por alporti la agordon inter lando kaj lando, inter homo kaj homo, en la tuta mondo.

Nia organizo Oomoto Internacia daŭrigos la klopodon pli fervore por la agado en Brasilia. Bonvolu doni la senŝanĝajn subtenon kaj kunlaboron al ni, mi petas sincere.

Hodiaŭ ni preparis por vi vespermaĝon kaj trinkaĵojn kaj kelkajn amuzajn prezentaĵojn: bonvole pasigu feliĉajn momentojn dum vi povos havi disponeblan tempon. Koran dankon!



► Salutas Majstrino

### Sanktaj Utaoj de Oomoto'utafesto

*Per la restarig'  
de l' utafesto, kiu  
antaŭ longa temp'  
jam ĉesis, prilumu mi  
nian mondon en nuntemp'.*

*Jen versante kaj  
versante la utaojn  
de l' japana land'  
senĉese mi sopiras  
al la Dio Susano*

*Ho, Utaa Fest',  
ĉi tiun mi restaŭras  
en la nuna temp'  
laŭ la japana moro  
en la fora Dia temp'!*

## Harmonia entre os países do mundo

— Saudação por ocasião do banquete comemorativo do 5º aniversário da Oomoto Internacia —

**Quinta Guia Espiritual  
Kurenai DEGUCHI**

**E**stimados e caros senhores e senhoras  
Com cordial saudação e agradecimento, dirijo-me a todos os senhores em virtude de sua presença nesta reunião comemorativa do 5º aniversário da Oomoto Internacia. E exprimo especial agradecimento aos senhores e amigos que nos ajudaram e colaboraram conosco até hoje.

Este ano, pois, é digno de congratulações também para o Brasil, visto que a Capital Brasília comemora seu 50º aniversário. Há 50 anos o então presidente Juscelino Kubitschek de Oliveira construiu uma assaz elegante, moderna cidade na região em que até então havia uma rude savana. E a Capital, que então era o Rio de Janeiro, transferiu-se para esta recém-construída cidade, isto é, para Brasília.

Desde então Brasília tem prosperado como metrópole do gigantesco continente e como centro educacional, econômico e político, exercendo importante papel para o progresso do Brasil.

Neste festejado ano de Brasília, também a Oomoto Internacia comemora seu 5º aniversário, e como eventos comemorativos organizamos o Festival de Uta em Esperanto, pela primeira vez em país não-japonês, bem como outros eventos relativos à data, como,

por exemplo, a Exposição sobre a história da Oomoto e da Associação Universal de Amor e Fraternidade, no Parlamento.

Entre outras coisas, o Festival de Uta que celebramos ontem, constitui importante evento em nosso país: ocorria desde a antiguidade até a idade média, em toda aldeia nipônica, e consistia num evento sagrado destinado a acalmar não apenas o coração de Deus, mas também a tranquilizar o coração dos aldeões, limpando todos os pecados.

Vejo um grande significado no fato de termos podido realizar este ato sagrado desta vez em Brasília, a santa capital do Brasil, por meio do Esperanto, a língua internacional que se coloca na base da humanidade.

Desejo, portanto, de coração, que esta ocorrência se torne uma boa oportunidade para trazer harmonia entre os países, entre os homens, no mundo inteiro.

Nossa organização Oomoto Internacia continuará a esforçar-se com mais fervor pela sua atividade em Brasília. Queiram nos fornecer o seu apoio e colaboração, eis o meu sincero pedido.

Hoje eu organizei para os senhores um jantar com bebidas e algumas apresentações divertidas: tenham a bondade de passar o tempo disponível como puderem.

Cordiais agradecimentos.



▶ A mestra com as representantes de organizações religiosas

### Utao de Kunfondinto

*Forprenante, jen,  
multoblan la barilon  
inter lando' kaj land'  
malfermas Dian tempon  
Mizu'no'Ookami.*

### Utao de la Dua Spirita Gvidantino

*Dankon al la fajr'  
favoron de la akvo  
dankon al la ter'  
favoron de la Tero,  
nepre ne forgesse ni.*

### Utao de la Tria Spirita Gvidantino

*Ne okazu plu  
konfliktoj inter landoj,  
restu nur homar'  
kun pura kor' jen estas  
mia hodiaŭa preĝ'.*

## Esperanta Utafesto de Oomoto en Brasilia

— Memore al la 50a datreveno de la ĉefurbo Brasilia —

**L**a 13an kaj 14an de oktobro, 2010, en la ĉefurbo Brasilia, okazis prospere la Esperanta Utafesto de Oomoto kun kelkaj koncernaj eventoj. La organizado de la Esperanta Utafesto en neĵapana lando estis unuafoja en ĝia longa historio. Krome, por Brazilo la jaro 2010 estis tiom memorinda, ke ĝia ĉefurbo Brasilia ricevis la 50-jaran jubilon de sia fondiĝo. Kaj, en tia ĉefurbo, plena je gratuletoso, ankaŭ Oomoto Internacia atingis sian 5an datrevenon. Por organizi la Utafeston kaj por gratuli la datrevenon de la ĉefurbo, el Japanio vizitis Brazilon la Kvina Spirita Gvidantino de Oomoto, sinjorino DEGUĈI Kurenai, kun 100 oomotanoj. Anticipante la Esperantan Utafeston de Oomoto en Brasilia, okazis la Utafesto en la Sud-Amerika Centro de Oomoto en la urbo Jandira, São-Paulo, ĉefe en du lingvoj la portugala kaj la japana. La Utafesto en ambaŭ urboj, Jandira kaj Brasilia, kun la ĉeesto de multaj partoprenantoj, Oomot-anaj kaj civitanaj, ja celebriĝis en granda sukceso.

### La Komuna Preĝo de Religiuloj



▶ Manpremas inter si tri reprezentantoj

En la 13a de oktobro, en ParlaMundi de TBV (Templo de Bona Volo), de la 19a horo ptm.komenciĝis la Komuna Preĝo de la Brazilaj religiuloj, kiel la antaŭevento de la Esperanta Utafesto de Oomoto. La ceremonion gvidis sinjoro Carlos Dorini (eks-estrarano de Brazila Esperanto-Ligo) en du lingvoj Esperanta kaj Portugala. Por tiu ĉi evento partoprenis 24 religiuloj el 11 internaciaj religiaj organizoj, agantaj en Brazilo. Krom la religiaj reprezentantoj partoprenis ankaŭ 200 esperantistoj kaj 100 japanaj Oomotanoj.

Unue, sinjoro KANAKOGI Tokio, la ĝenerala sekretario de UHA (Universala Homama Asocio), surscenejiĝis kiel ĉefcelebranto kaj



▶ Ĉefpastro ĉantas Utaon Jakumo

ĉantis Utaon Jakumo (Jakumo-ŝinka) fronte al Utagaki (Utaaltaro) kun la akompano de pafarka tambulo por peti Dion malsuprenveni sur la sanktan kolonon de la Utaaltaro.

Post la solena diservo sinjoro Paulo Medeiros, administranto de TBV, surscenejiĝis kaj salutis reprezentante la organizantojn (Oomoto, LBV, URI). Li, en la nomo de sinjoro Pava Netto, la prezidanto de LBV (Legio de Bona Volo), bonvenigis ĉiujn partoprenantojn, kaj esprimis la honoron kaj ĝojon akcepti la Utafeston, kiu estas la plej malnova kaj tradicia kulturo de Japanio. Post la saluto de sinjoro Paulo Medeiros, surscenejiĝis sinjoro Elianildo Nascimento, la prezidanto de URI (Unueca Religia Iniciativo) kaj ekstaris fronte al la altaro. Li dediĉis preĝvortojn al Dio, reprezentante ĉiujn religiajn organizojn, ĉeestantajn tie. Unue li dankis Dion, dirante “Ni dankas Vin, Sinjoro, pro la boneco kaj amo al la homaro, elmontritaj pere de ĉiuj sanktaj revelacioj tra ĉiuj tempoj”. Kaj plue li esprimis la dankemon al diversaj sanktuloj, spiritoj kaj eminentaj religiuloj. Post la preĝvortoj de sinjoro Elianildo Nascimento, kiel la lastan programeron de la Komuna Preĝo, ĉiuj ĉeestantoj dediĉis silentan preĝon kaj poste manpremis kun siaj proksimuloj dekstra kaj maldekstra, antaŭa kaj malantaŭa. En la salono ja pleniĝis la etoso de varma amikeco.

### Esperanta Utafesto

Post 15-minuta paŭzo sursceneje aperis sinjoro MASE Iyori por kvietigi la atmosferon per flutado. En la salono trasonoris la pura flutsono. Dum ankoraŭ restas postsono de la flutado, surscenejiĝis la ĉefcelebranto,

# Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto, em Brasília

— Em memória do 50º aniversário de Brasília —

Nos dias 13 e 14 de outubro de 2010 foi realizado em Brasília, com sucesso, o Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto, seguido de alguns eventos concernentes à festividade. Esse festival foi o primeiro a ser realizado fora do Japão, em sua longa história. Além disso, o ano de 2010 é também memorável para o Brasil, pois nele sua Capital, Brasília, comemora o jubileu de seus 50 anos de fundação. E, nessa Capital, cheia de clima festivo, também a Oomoto Internacia (Oomoto Internacional) comemora seu 5º aniversário de fundação. Para organizar o Festival de Uta e comemorar o aniversário da Capital, do Japão visitaram o Brasil a Quinta Guia Espiritual da Oomoto, sra. Kurenai DEGUCHI, acompanhada de 100 oomotanos. Antecipando o Festival de Uta da Oomoto, em Esperanto, realizado em Brasília, realizou-se o Festival de Uta no Centro Sul-americano da Oomoto, na cidade de Jandira-SP, principalmente em duas línguas: português e japonês. O Festival de Uta em ambas as cidades, Jandira e Brasília, com a presença de numerosos participantes, oomotanos e não-oomotanos, foi realizado com grande sucesso.

### Prece comum de Religiosos

Dia 13 de outubro, no ParlaMundi do TBV (Templo da Boa Vontade), às 19 horas, iniciou-se a Prece Comum dos religiosos brasileiros, como



▶ Ao som de flauta surge o mestre de cerimônia

